

Heinrich Heine,  
Du bist wie eine Blume

Du bist wie eine Blume  
so hold und schön und rein;  
ich schau' dich an, und Wehmut  
schleicht mir ins Herz hinein.

Mir ist, als ob ich die Hände  
aufs Haupt dir legen sollt',  
betend, dass Gott dich erhalte  
so rein und schön und hold.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-475-916 (2008-07-15 12:07:47)*

Heinrich Heine,  
Vi estas tiel bela

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Vi estas tiel bela  
samkiel ĉarma flor';  
vidante vin, doloron  
mi sentas en la kor'.

Surmeti la manojn sur vian  
kapeton inklinas mi,  
preĝante, ke ĉarma kaj bela  
konservu vin ĉiam Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Du bist wie eine Blume" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2001-09-20.*

*MR-365-1 / Arg-475-917 (2008-07-15 12:10:51)*

Heinrich Heine,  
Vi estas al mi kiel floro

*tradukita de Hein Wernik*

Vi esta al mi kiel floro  
Pro puro kaj bel' kaj graci',  
Mi vidas vin, kaj en la koron  
Kaŝiras la melankoli'.

Mi volus sur vin preĝe meti  
La manojn, floranta juvel';  
Ke gardu vin Dio pro via  
Gracio kaj puro kaj bel'.

*Traduko de la Germana poemo "Du bist wie eine Blume" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Hein Wernik en 1994.*

*Arg-475-918 (2010-05-26 19:16:04)*

*La adreso de s-ro Hein Wernik estas: Prinsenlaan 26, NL-6542 TB Nijmegen, Nederlando.*